



BULTENO

Organo de la Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio — (TEĴA)

Aprilo №1

Sofia, Bulgaria

1957

NIAJ TASKOJ

Karaj gesamideanoj ĵurnalistoj,

Ĉe la Universala Esperantista Kongreso en Kopenhago en la somero 1956 oni decidis restarigi kaj reaktivigi la Tutmondan Esperantistan Ĵurnalistan Asocion. Estis elektita nova 7-membra Estraro de TEĴA. Sed la laboro de TEĴA ĝis nun malrapide progresas. Tial estas treege necesa la apogo de ĉiuj esperantistoj-ĵurnalistoj, korespondantoj, redaktoroj, publicistoj k.a.

Ni petas vin ĉiujn, niajn nunajn membrojn, malnovajn ne jam aligintajn al la Asocio membrojn kaj ĉiujn ĵurnalistojn - esperantistojn tuj ekagu! Nia nua urĝa tasko estas propagandi la celojn de TEĴA inter niaj kolegoj kaj varbi ilin kiel membrojn de la Asocio. Vi ĉiuj estas petataj tuj anonci vin ĉe unu el la estraranoj de TEĴA, ĉe via landa reprezentanto au rekte ĉe la Sekretariejo. Se vi konas esperantistojn, kiuj dezirus membriĝi, sendu ties adresojn al la Sekretariejo de la Asocio.

La celo de TEĴA estas organizi ĉiujn ĵurnalistojn, scipovantajn Esperanton, por komuna kunlaborado kaj interhelpo en la kadro de ilia ĵurnalista laboro: interŝanĝo de gazetmaterialoj, informoj kaj profesia sperto, reciproka gastigo, aranĝo de renkontoj inter diverslandaj ĵurnalistoj, ilia helpado ĉe vojaĝoj eksterlande ktp. Nia grava tasko estas ankaŭ propagandi Esperanton inter niaj kolegoj, konvinki ilin pri la taŭgeco de la internacia lingvo, pri ĝiaj praktikaj celoj.

Uzante la adresojn de la TEĴA-membraro, la ĵurnalistoj-esperantistoj povas kontakti kaj kunlabori laŭ siaj intereso. Poste, kiam TEĴA plifortiĝos, la Estraro de TEĴA, laŭ sia plano, organizos interŝanĝon de ĵurnalistaj materialoj - artikoloj, korespondaĵoj, fotoj, bildoj ktp. Samtempe TEĴA havas la taskon aktivigi siajn membrojn por aperigi materialojn en la esperantaj kaj nacilingvaj gazetoj pri la en-kaj eksterlanda Esperanto-movado.

Ni bezonas delegitojn en ĉiuj landoj, kaj se vi havas adresojn de ĵurnalistoj en landoj ne reprezentataj en ĉi-suba listo de la Estraro kaj la landaj reprezentantoj, bonvolu senprokraste sciigi ilin al la Sekretariejo.

Karaj gesamideanoj ĵurnalistoj, redaktoroj, korespondantoj kaj publicistoj, tuj aligu al TEĴA! Helpante la konstruadon de nia profesia internacia organizaĵo, kreante kaj plivastigante viajn internaciajn kontaktojn kun kolegoj-ĵurnalistoj, vi helpas vian propran ĵurnalistan laboron!

E s t r a r o d e T E Ĵ A

NIA BULTENO

Jen estas la unua numero de nia BULTENO. Pro kio ĝi aperas? Kiajn celojn kaj taskojn ĝi metas antaŭ sin?

La esperantistoj-jurnalistoj estas dise loĝantaj en ĉiuj landoj, sur ĉiuj kvin kontinentoj de la terglobo.

Estus neeble efike kontaktigi ilin, organizi ilin, doni al ili taskojn, se ni ne havus nian komunikilon, nian BULTENON.

Efektive, kelkaj Esperanto-gazetoj afable disponigis al TEĴA siajn paĝojn, sed la ĝisnuna sperto atestas, ke ni ne povus aktivigi niajn landsekciojn kaj la izolajn membrojn per malofta publikigado de mallongaj informoj en gazetoj kiel "Esperanto" de UEA aŭ "Norda Prismo", kiu eĉ ne aperas ĉiumonate.

En la nuna restariga periodo de TEĴA, ĝia BULTENO ludos antaŭ ĉio la rolon de **o r g n i z a n t o** de niaj vicoj, de nia laboro.

En ĝi aperos regule la direktivoj, instrukcioj, sciigoj de la Estraro. Ĝi publikigos la adresojn de niaj membroj, ebligante tiamaniere ilian interkontaktigon kaj kunlaboradon. Per siaj informoj, adresaroj, anoncoj ĝi estos neanstataŭebla helpanto de ĉiu aktiva ĵurnalisto. Ĝi aperigos sur siaj paĝoj artikolojn kaj korespondadojn, montrantaj la sperton de la landaj sekcioj kaj de la apartaj membroj. La BULTENO helpas la preparadon kaj la organizadon de nia ĉiuflanka ĵurnalisma laboro. Ĝi resumos kaj sistemigos la rezultojn de tiu ĉi laboro.

Sed por plenumi tiun ĉi sian rolon, por povi respeguli la vivon de nia Asocio, por esti efektiva kaj efika gvidanto kaj organizanto de niaj iniciativoj kaj aktivecoj, nia BULTENO devas nepre havi la amasan kaj sindonan apogon de ĉiu ĵurnalisto, redaktoro, publicisto kaj korespondanto.

Ni ne dubas, ke la samideanoj ĵurnalistoj ĉiulandaj, sendepende de rasa aŭ nacia aparteno, de religia konfeso aŭ politika konvinko, senrezerve kaj amase apogos sian BULTENON, sendante al ĝi siajn adresojn, varbante membrojn, kontribuante per siaj materialoj, donante al la redakcio siajn sugestojn.

Samideanoj ĵurnalistoj! La BULTENO estas via parolilo, via tribunuo, Prenu ĝin en viajn manojn, vivigu ĝin, aktive helpu ĝian redaktadon kaj eldonadon, disvastigu ĝin inter viaj konataj ĵurnalistoj! Per tio vi plenumos vian profesion kaj esperantistan devon.

Vivu nia BULTENO, instrumento de nia internacia solidareco kaj kunlaborado!

Vivu TEĴA!

x x x

Karaj samideanoj ĵurnalistoj el la tuta mondo! Tuj aliĝu al TEĴA! Varbu membrojn! Pagu vian kotizon rekte al la kasisto de TEĴA aŭ al la reprezentanto en via lando! Aperigu artikolojn kaj sciigojn pri TEĴA en viaj esperantistaj kaj nacilingvaj gazetoj kaj ĵurnaloj!

x x x

Ĵurnalisto kaj pentristo dez.kor.kaj interŝ.gazetmaterialojn, pentraĵetojn kun kolegoj kaj kun aliaj gesam-anoj pri profesiaj kaj diversaj temoj kun ĉiuj landoj. USSR, Kaukazio, Krasnodarskij Kraj, gorod Tuapse-2, ul.Furmanova 3. Gardi Oskar K.

NIA BULTENO

Jen estas la unua numero de nia BULTENO. Pro kio ĝi aperas? Kiajn celojn kaj taskojn ĝi metas antaŭ sin?

La esperantistoj-jurnalistoj estas dise loĝantaj en ĉiuj landoj, sur ĉiuj kvin kontinentoj de la terĝlobo.

Estus neeble efike kontaktigi ilin, organizi ilin, doni al ili taskojn, se ni ne havus nian komunikilon, nian BULTENON.

Efektive, kelkaj Esperanto-gazetoj afable disponigis al TEĴA siajn paĝojn, sed la ĝisnuna sperto atestas, ke ni ne povus aktivigi niajn landsekciojn kaj la izolajn membrojn per malofta publikiĝado de mallongaj informoj en gazetoj kiel "Esperanto" de UEA au "Norda Prismo", kiu eĉ ne aperas ĉiumonate.

En la nuna restariga periodo de TEĴA, ĝia BULTENO ludos antaŭ ĉio la rolon de **o r g n i z a n t o** de niaj vicoj, de nia laboro.

En ĝi aperos regule la direktivoj, instrukcioj, sciigoj de la Estraro. Ĝi publikigos la adresojn de niaj membroj, ebligante tiamaniere ilian interkontaktigon kaj kunlaboradon. Per siaj informoj, adresaroj, anoncoj ĝi estos neanstatauebla helpanto de ĉiu aktiva ĵurnalisto. Ĝi aperigos sur siaj paĝoj artikolojn kaj korespondaĵojn, montrantaj la sperton de la landaj sekcioj kaj de la apartaj membroj. La BULTENO helpas la preparadon kaj la organizadon de nia ĉiuflanka ĵurnalisma laboro. Ĝi resumos kaj sistemigos la rezultojn de tiu ĉi laboro.

Sed por plenumi tiun ĉi sian rolon, por povi respeguli la vivon de nia Asocio, por esti efektiva kaj efika gvidanto kaj organizanto de niaj iniciativoj kaj aktivecoj, nia BULTENO devas nepre havi la amasan kaj sindonan apogon de ĉiu ĵurnalisto, redaktoro, publicisto kaj korespondanto.

Ni ne dubas, ke la samideanoj ĵurnalistoj ĉiulandaj, sendepende de rasa au nacia aparteno, de religia konfeso au politika konvinko, senrezerve kaj amase apogos sian BULTENON, sendante al ĝi siajn adresojn, varbante membrojn, kontribuante per siaj materialoj, donante al la redakcio siajn sugestojn.

Samideanoj ĵurnalistoj! La BULTENO estas via parolilo, via tribuno, Prenu ĝin en viajn manojn, vivigu ĝin, aktive helpu ĝian redaktadon kaj eldonadon, disvastigu ĝin inter viaj konataj ĵurnalistoj! Per tio vi plenumos vian profesion kaj esperantistan devon.

Vivu nia BULTENO, instrumento de nia internacia solidareco kaj kunlaborado!

Vivu TEĴA!

x x x

Karaj samideanoj ĵurnalistoj el la tuta mondo! Tuj aliĝu al TEĴA! Varbu membrojn! Pagu vian kotizon rekte al la kasisto de TEĴA au al la reprezentanto en via lando! Aperigu artikolojn kaj sciigojn pri TEĴA en viaj esperantistaj kaj nacilingvaj gazetoj kaj ĵurnaloj!

x x x

Ĵurnalisto kaj pentristo dez.kor.kaj interŝ.gazetmaterialojn, pentraĵetojn kun kolegoj kaj kun aliaj gesam-anoj pri profesiaj kaj diversaj temoj kun ĉiuj landoj. USSR, Kaukazio, Krasnodarskij Kraj, gorod Tuapse-2, ul.Furmanova 3. Gardi Oskar K.

EL LA VIVO DE NIAJ SEKCIOJ

La ĵurnalistoj-esperantistoj en Bulgario aktiviĝas

Kiel sciante, en la kadro de la 32-a Kongreso de Bulgara Esperantista Asocio pasintjare en Sofio okazis fakkunsido de la membroj de la Ĵurnalista Sekcio ĉe la Bulgara Esperantista Asocio. La kunsido aprobis la regularon de la Sekcio kaj akceptis interalie jenajn decidojn:

1. La ĵurnalistoj-esperantistoj organizu kaj efektivigu vigan internacian korespondadon per Esperanto k.a. lingvoj, interŝanĝon de gazetmaterialoj, de korespondaĵoj kun alilandaj ĵurnalistoj, publicistoj k.a. La ricevitajn korespondaĵojn oni publikigu en la bulgara gazetaro, en la murgazetoj kaj disaudigu per la radio kaj la lokaj radio-retoj.

2. Ĉiu membro de la sekcio varbu novajn membrojn kaj altiru ilin al aktiva kunlaborado.

3. Estas rekomendite, ke la ĵurnalistoj fariĝu fakdelegitoj de UEA pri ĵurnalismo.

4. La ĵurnalistoj-esperantistoj propagandu Esperanton intersiaj kolegoj-ĵurnalistoj kaj aperigu en la gazetaro por-kaj priesperantaj materialoj.

5. La ĵurnalistoj-esperantistoj per sia diversflanka laboro, per siaj internaciaj rilatoj laboru senĉese por la plifirmigo de la tutmonda paco.

La kunsido elektis kiel estraro de la Sekcio samideanojn Asen Grigorov, Atanas Lakov kaj Ivan Keremidĉiev - Esperov. Kiel sekretario de la Sekcio estis elektita Ivan Keremidĉiev.

La estraro de la Sekcio starigis bonajn rilatojn kun la Asocio de la Ĵurnalistoj en Bulgario, kiu disponigis al ni la salonojn de sia domo por renkontoj kaj kunvenoj de la Sekcio. En unu renkonto la sofiaj membroj de la Sekcio decidis proponi al la Centra Estraro de TEĴA la aperigon de TEĴA - Bulteno en nia lando.

La estraro de la sekcio kontaktis kun la Centra Estraro de TEĴA, kiu akceptis la proponon de la bulgaraj ĵurnalistoj-esperantistoj. La estraro de la Sekcio kontaktis ankaŭ kun aliaj eksterlandaj ĵurnalistoj-esperantistoj kaj ĵurnalistaj organizaĵoj.

Dum sia vojaĝo al la 13-a Kongreso de Pollandaj Esperantistoj, kiu okazis en la fino de oktobro 1956 en Varsovio, la estraranoj de la Sekcio samideanoj Asen Grigorov kaj Ivan Keremidĉiev renkontiĝis kun ĵurnalistoj-esperantistoj kaj kun gvidantoj de la Esperanto-movadoj en Hungario, Ĉeĥoslovakio, Pollando, Austrio kaj Jugoslavio, kun kiuj ili pritraktis la necescon de organizo de ĵurnalistaj Esperanto-sekcioj kaj grupoj en tiuj landoj. Ili vizitis en Praga la sidejon de la Internacia Organozaĵo de la Ĵurnalistoj kaj de la Ĉeĥoslovaka Ĵurnalista Asocio. Ili pritraktis kun respondecaj personoj la demandon pri nia peresperanta ĵurnalista laboro. La sama demando estis tuŝita ankaŭ en la kunsido de la Internacia Esperanto-Konferenco, okazinta post la kongreso de Pollandaj Esperantistoj en Varsovio, kun reprezentantoj de la Esperantomovado kaj ĵurnalistoj de Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Ĉinlando, Hungario kaj Pollando. En tiuj renkontoj estis pridiskutitaj demandoj pri nia estonta laboro ĵurnalista, pri fondo de ĵurnalistaj sek-

cioj, interŝanĝo de ĵurnalistaj materialoj, reciproka gastigo kaj somerumado de ĵurnalistoj-esperantistoj ktp. Dum la Pollanda Esperanto-kongreso estis fondita ĵurnalista sekcio.

Nia bulgara ĵurnalista sekcio kontaktas kun samideano Emil Mayer en Krakovo, kiu respondecas pri la ĵurnalista-esperantista laboro kaj estas reprezentanto de TEĴA en Pollando. Aktive ni korespondas ankaŭ kun samideanoj Joĵko Stanek en Praha kaj Stefan Freamat en Bukureŝto, kiuj nun laboras por starigo de ĵurnalistaj sekcioj en Ĉeĥoslovakio kaj Rumanio kaj varbas membrojn por TEĴA.

Akceptinte la inviton de siaj bulgaraj samideanoj kaj kolegoj, la pasintan jaron vizitis nian landon la ĵurnalistoj samideano M. Robineau el Francio, samideano St. Freamat el Rumanio kaj samideano O. Thormodsén el Norvegio. Post sia reveno ili aperigis interesajn artikolojn en la gazetoj, kie ili kunlaboras.

Al la ĵurnalista sekcio en nia lando jam aliĝis pli ol 50 esperantistoj-ĵurnalistoj, korespondantoj, publicistoj kaj redaktoroj ĉe eldonejoj.

La sekcio laboras laŭplane. Al ĝiaj membroj estas disdonitaj adresoj de fremlandaj ĵurnalistoj-esperantistoj, kun kiuj ili korespondas, interŝanĝas ĵurnalistajn materialojn kaj profesian sperton. Kelkaj sofiaj sekcianoj helpas la Centran Komitaton de la Bulgara Esperantista Asocio, redaktante Esperanto-revuon, bultenojn, diversajn informilojn ktp. La profesiaj kaj neprofesiaj sekcianoj aperigas artikolojn, informojn kaj sciigojn en diversaj ĉefurbaj kaj provincaj gazetoj pri Esperanto kaj pri la enlanda kaj eksterlanda Esperanto-movado.

Nun la estraro de la Ĵurnalista Sekcio varbas membrojn por TEĴA kaj preparas la grundon por la organizado de reciproka gastigo kun siaj eksterlandaj kolegoj.

Ivan Kerimidĉiev - Esperov

sekretario de la Ĵurnalista Sekcio ĉe BEA

KIU RAJTAS ESTI MEMBRO DE TEĴA

A. Ĉiu profesia ĵurnalista, kiu vivtenas sin per laboro ĉe gazeto, rajtas esti membro de TEĴA (A-membro).

B. Rajtas esti membro de TEĴA ankaŭ ĉiu samideano, kiu havas rilaton al la gazetara laboro: korespondanto ĉe loka aŭ landa ĵurnalo, publicisto de artikoloj, tradukisto, redaktoro ĉe libroeldonejo, redaktoro de Esperanto-gazeto, korektisto ktp. (B-membro).

Adreso de la Sekretario de TEĴA: G. Jepsen, redaktoro, Silkeborg Avis, Silkeborg, Danlando.

KIEL PAGI LA MEMBROKOTIZON AL TEĴA

Pro la neregula stato de la internaciaj financaj rilatoj, la pagado de la membrokotizo al TEĴA ne estas facila afero. Ĉi sube ni indikas la diversajn manierojn de pagado. La jarkotizo egale por A kaj B-membroj estas fiksita je: 1 dolaro aŭ 350 francaj frankoj, 2 okcident-germanaj markoj, 7 ŝilingoj, 40 pesetoj aŭ 14 steloj internaciaj.

Oni sendu la kotizon egalvaloran al 350 francaj frankoj al la poŝtĉekkonto numero 30-900 de la kasisto de TEJA (vidu la adreson ĉi sube).

Per internaciaj mandatoj oni devas sendi 370 fr. fr., ĉar tiuj mandatoj ĉe ilia alveno ricevas imposteton de 20 fr. fr. Oni povas sendi 12 internaciajn stampitajn respondkuponojn, au 14 internaciajn stelojn de la Universala Ligo, esperantajn poŝtmarkojn lau valoro de la katalogo Ivet minus 20%, au enlandajn bankbiletojn (kiam permesate) egalvalorajn al la montritaj ĉi supre kotizoj.

Oni povas pagi la kotizon (post interkonsento kun la kasisto) ankau per als endo de literaturaj verkoj kiel ekzemple: "Jugoslavio kaj ĝiaj popoloj", "Sinjoro Tadeo" k.ĉ.

• Andre Ribot-kasisto de TEJA

Adreso: 11 rue Paul Vergnes, Marmande, Francio

ESTRARO DE TEJA

Prezidanto: D-ro Ference Szilagy, Mariedalsgatan 9, Boras, Svedio

Vicprezidanto: Redaktoro Kavenius, Niklasenkatu 10/14, Turku 9, Finnlando

Rimarku: La Vicprezidanto nuntempe fukcias kiel prezidanto

Sekretario: Redaktoro G.Norgaard Jepsen, Skovvangen 17, Silkeborg, Danujo

Vicsekretario: F-ino Vogel, Kniebisstrasse 31, Stuttgart, Germanujo

Kasisto: S-ro André Ribot, 11 rue Paul Vergnes, Marmande, Francujo

Estraranoj: Matko Dobčnik, Titov trg. 3, Celje, Jugoslavio

D-ro A.Mildwurf, 71, Compayne Gardens, London NW 6, Britujo

Landaj reprezentantoj:

Pollando: Emil Mayer, Florianska 4/3, Krakow

Bulgario: Ivan Keremidčiev-Esperov, Bulv.Hristo Botev 98, Sofio II

Norvegujo: O.Thormodsen, Box 132, Haugesund

USSR: I.Hoves, Poŝtkesto 1004, Moskvo-Centro

Cehoslovakio: Jojko Stanek, Osadní 45, Praha 7, Holešovice

Rumanujo: Stefan Freamat, redakcia ziarului "Nunca", Bukureŝto

Membroj de TEJA:

Bertil Frederiksson, Renstav 25, Spanga, Svedlando

Goluzin Wkodziemierz, Debne ul.Szara 1, woj.Szcrecin, Pollando

Walerian Wlodarczyk, Warszawa 26, ul.Swietoslawska 57, Pollando

Jerzy Uŝpieński, Warszawa 10, ul.Mokotowska 3 m, 39 a, Pollando

Caba Rigo, IX, Tuzoltó, u 23, Budapest, Hungarujo

Stanislaw Rams, Zielona Góra, ul.Zyty, bl.III, m 22, Pollando

M.Niewiarowski, Katowice, Silesia, ul. Kl Zetkin 21 m 5, Pollando

Turek Alojzy - Krakow, Kielecka 17 m 5, Pollando

Wyrwich Leszek, Krakow, Bitwy pod Lenino 5 m 114, Pollando

Saduski Stanislaw, Krakow, 1 maja 2 m 5, Pollando

Szezepanska-Walles Irena, Krakow, A1 Slowackiego 60/2, Pollando

Malycha Kazimierz, Bydgoszez, Król, Jadwigi 17/4, Pollando

Asen Grigorov, bulv. Tolbuhin 10, Sofio, Bulgarujo
 Atanas Lakov, bulv. Tolbuhin 55, Sofio, Bulgarujo
 Violin Oljanov, ul. Ivan Vazov 17, Sofio, Bulgarujo
 Kiril Draĵev, ul. Oborište 77, Sofio, Bulgarujo
 Krestjo Karucin, Partijno Izdatelstvo, bulv. Lenin 47, Sofio, Bulgarujo

Atanas Stamatov, ul. Dimo Haĝidimov 21, Sofio, Bulgario
 Frant Zachnit, Svinov ĉe Ostrava, Ĉeĥoslovakio

(Daurigota)

SCIIGOJ

Grava sciigo! Ek de la 2-a numero nia Bulteno certe aperos tipografie presate sur pli bona papero. La redakcio faras la necesajn provojn tiurilate.

La Asocio de la Jurnalisto en Bulgario publikigis en la decembra numero 1956 j. de sia oficiala Bulteno infomon pri la vojaĝo de samideanoj Asen Grigorov kaj Ivan Keremidĉiev en Hungario, Ĉeĥoslovakio, Pollando, Austrio kaj Jugoslavio kaj kun kontenteco mencias ilian poresperantan jurnalistan laboron.

En la decembra numero 1956 j. de "Demokrata Jurnalisto" - organo de "Internacia Organizaĵo de la Jurnalisto", kiu aperas en Prago, estis presita informo pri la restarigo de TEĴA (Tutmonda Esperantista Jurnalista Asocio) kaj pri ĝia nova estraro.

x x x

Kvindek bulgaraj jurnalisto kaj redaktoroj volas kontakti kun ĉiulandaj jurnalisto, redaktoroj, korespondantoj de nacilingvaj kaj Esperanto-gazetoj, por interŝanĝi materialojn kaj sperton. Skribu al la sekretario de la Sekcio de l' Jurnalisto ĉe Bulgara Esperanto-Asocio Ivan Keremidĉiev, "Rabotniĉesko Delo", bulv. Lenin 47, Sofio, Bulgario.

x x x

TEĴA-anoj! Partoprenu la 42-an Universalan Esperanto-Kongreson en Marseille, 3-10 agosto 1957. Adreso: 32, Cours Estienne d'Orves, Marseille, Francujo, Partoprenu la fakkunsidon de TEĴA!

x x x

Bulgaraj jurnalisto deziras viziti la 42-an Universalan Esp. Kongreson. Par realigi sian intencon ili serĉas francajn kolegojn por reciproka gastado. Francaj kolegoj, kiuj konsentus pri simila gastado bonvolu anonci sin al la redakcio de la Bulteno!

x x x

Al la redakcioj de la Esperanto-revuoj, jurnaloj, gazetoj kaj bultenoj ni sendas nian Bultenon intersange.

x x x

Redakcia adreso de la Bulteno: Sofia II (Bulgario),
 bvd Hristo Botev 98 - Ivan Keremidĉiev.